


SUDFRANCIA STELO

N° 200 - 1a kvaronjaro 2012 - 1^{er} trimestre 2012



**Bulteno eldonita de la
Esperanto-Federacio de
Langvedoko-Rusiljono**



F
E
T
E

D
E
S

P
E
U
P
L
E
S

12
03
12

Enhavo:

- P 2 : CR federacia kunveno
- P 6 : novaĵoj el niaj grupoj
- P 9 : « Le monde à Montpellier »
- P 10 : Kien iros ?
- P 15 : Mortis René Bénazet
- P 16 : Zamenhof, hillélisme kaj homaranismo
- P 19 : Eŭgeno el Birobiĝano
- P 20 : Tibor Sekelĵ (fina parto)
- P23 : Espérantistes de Lozère et l'Espéranto à la fête des peuples
- P 24 : Helpu al Pasporta Servo
- P 25 : Literatura mondo en ligne
- P 26 : Teleskopo !
- P 26 : Esperanta Retradio
- P 28 : Atomenergio ?

Bonvolu sendi viajn informojn, fotojn artikolojn, kaj novaĵojn al Christian MOURE
15, rue du Verdier 34120 TOURBES xianmoure@orange.fr
Comité de relecture : Josée BOCCADIFUOCO, Marie-Blanche FONDRILLON, Arno LAGRANGE

Esperanto-Federacio de Langvedoko-Rusiljono
Federacia jara kunveno 31/03/2012

La 31an de marto 2012, de la 10a ĝis la 13a, okazis la jara kunveno de la Esperanto-Federacio de Langvedoko-Rusiljono en Nîmes. Post komuna manĝo la ĉeestantoj povis spekti bildprezenton pri la Esperanta Vikipedio. Fine okazis lotumado.

1 bonvenigo senkulpiĝoj sinprezento

Ĉeestas :

el Heraŭlto:

el CBE (Bitero):

Aurelia Gouin-Pellerin, Laurence Esclapez (LE), Jean-François Passarella (JFP, Prezidanto, Servian), Véronique Bichon (VB), Marie-Blanche Fondrillon

el Montpeljero:

Jeanine Bony (JeB), Josée Boccadifuoco (JoB), Martine Ragonnet (MR), Monique (ME) kaj Serge Eysseric (SE),

el Gardo:

Frédéric Bourquin (FBq), Maria Pérez y Sanz (MPS), Claudine Coulomb, Evelyne Banaszek (EB), Claude Wurmser, Zohra Mraihy (ZM)

el Lozero:

Monique kaj Francis Bernard (FBe, Espéranto-Info),

el Aldeo:

Arno Lagrange (AL, Sekretario, Sigean),

el Arles (Rodanelfluejo)

Lucas Périer, Astrid Klein

senkulpiĝas

Line Maurel, Christian Mouré, Dalia Villamosa, Colette Carbonnel, ge-Taupiac, Joëlle Cuq, Ge-Bouman, Rosy Chatenet, Hubert Martin.

prezidas Jean-François Passarella.

protokolas Arno Lagrange.

2 Agadraporto

Pri IREM: JFP plu zorgas pri tratado kun SACEM.

IS en Seto okazis nek en 2011 nek en 2012. Ĉu okazos en 2013? Estas decidinda antaŭ novembro. JFP informiĝos por scii ĉu eblas gastigi grupon en 'Le Lazaret' en aŭgusto 2013, kaj kiom disponeblas por monhelpi kunorganizantojn. Pretas helpi LE, FBq MR EB ge-E. Kunveno okazos antaŭ junifino. Demando estas ĉu IS povas okazi se organizantoj devas krome pagi sian restadon. Inter la kostoj ja estas la restadokostoj de la geinstruistoj. La komisiono pretigos antaŭtaksan buĝeton por aprobo dum la venonta federacia kunveno.

3 Financa raporto

MPS prezentas la financon raporton. 7000 € estis ĝiritaj de la poŝtkonto al la ŝparkonto. Federacio enspezis pro IREM, pro la vojaĝo al Pollando en

2009. Cetere ĉesinta klubo en Perpinjano ĝiris sian havaĵon. Aliĝintoj ricevu rememorigon por renovigo de kotizoj.

4 Renovigo de la komitato

Reelektitaj estas Jean Henin, Jeanine Bony, Laurence Esclapez, Arno Lagrange, Pierre Taupiac. Novelektita estas Evelyne Banaszek. Cetere VB reprezentas la Federacion en komitato de Eo-F.

JFP anoncas ke dum renovigo en 2013 li ne reprezentos sin.

5 Raportoj pri pasintaj agadoj kaj renkontiĝoj

- **Montpellier:**
 - «*Le monde à Montpellier*» la 24an de marto, en *maison des relations internationales* partopreno en aranĝo «*Le monde à Montpellier*», unuafoje kaj prove okazinta ĉi-jare, okazonta laŭplane ĉiujare, organizita de asocio «*Holdub collectif*». Olivier Manfredi prizorgis la interrilatadon. La ideo estas prezenti ĉiujn landojn el kiuj estas elvenintoj en Montpellier. Estis deko da budoj (Turkio, Madagaskaro, Rusio, ktp), koncertoj (Hispana muziko, marokaj vestoj, rusaj kantoj, gabona kaj kurda dancoj, ktp). Ĉiu partoprenanto estis petita pretigi norman slipon por prezenti sian devenlandon. Olivier plenigis la slipon respondante al demandoj «Areo de la lando»: la tuta

terglobo, «Ĉefa produktaĵo»: Espero. Antaŭvidita estas venontjara partopreno. (Pri tio vidu ankaŭ sube) <http://allevents.in/Montpellier/LE-MONDE-A-MONTPELLIER/176061339172826>

- **Ĝenerala asembleo** : Josée Boccadifuoco estas elektita prezidanto, Serge Eysseric, antaŭa prezidanto fariĝis vic-prezidanto.

- **Lozère:**
 - Alain Runel kaj ge-Bernard gvidas grupon kunvenantan ĉiusemajne (marde pm, 8 aliĝantoj)

- En Mende katolika pastro organizas ĉiujare la «Feston de la popoloj» kun budoj, komuna manĝo (1000 kunmanĝantoj); partoprenas katolikoj, protestantoj, islamanoj, senreligiuloj. Dum vespera spektaklo la publiko estas bonvenigita en 60 lingvoj. Forumon pri Esperanto arigis 8 interesiĝintojn.

- Elsendo en Radio Florac ankaŭ aŭskultebla perrete

- **Nîmes** : FBq raportas pri radioelsendo en oktobro. Artikolo en la bulteno de «Maison de l'Europe». ZM demandas kiel rehavi la entenon de ŝranko apartenanta al antaŭe aktivinta klubo.

- Gustave Blary el Arles forpasis la 25an de marto 98-jaraĝa, postlasante kolekton da Eo-libroj. Lia bofilino Astrid Klein, ne-Esperantisto portis la librojn por disdoni.

- Les Issambres: Pluraj el niaj anoj (SE ME LE Dalia ...) partoprenis en malkrokodila lingva staĝo (Mediterranea Esperanto-Semajno). Gvidis Zsófia Kóródy kaj Peter Zilvar el Germanio, Perla Mielo el Hungario kaj Pascal Vilain (kiu prezentis la semantikan teorion laŭ GL).

<http://www.mlboleslav.cz/esperanto/wp-content/uploads/MES-Issambles.pdf>

6 Estontaj federaciaj aŭ lokaj rendezuoj kaj agadoj

- FBq: 2a de junio : interasocia projekto ekskursi al Béziers kaj Agde laŭ Suda Kanalo

- SE : 23-24a de junio Esperanta ekskurso al Altprovencaj Alpoj (siderostat en Saint-Michel-l'Observatoire, olivarbmuzeo en Abatejo de Ganagobie, Pentofarantoj en Les Mées, Digne: geologiaj kuriozaĵoj, konstruo de sunenergicentralo, Cadarache) per minibuso po 100€ (vidu en <http://esperantonimes.wordpress.com/>)

- Katalin Kovats eble vizitos Montpeljeron (estinte en Bergerac)

- de la 30a de septembro ĝis la 3a de oktobro Renato Corsetti kaj Anna Löwenstein restados en Montpeljero turismos kaj prelegos.

7 Aliaj demandoj

- FBq starigas la demandon pri videbleco de Esperanto por la publiko

- ZM atestas ke dum sia plurjara agado en lernejoj, kiam unu homo foriĝis de sia posteno, la tuta antaŭa agado forfalis

- SE emfazas mesaĝon de Law anoncanta ke nun Guglo proponas Esperanton kiel novan font- kaj cel-lingvon

- AL baze de spertoj en Tuluzo kaj Strasburgo kaj enketo en Roterdamo emfazas gravecon de konstanta kaj pacienca laboro (kia regula ĉeesto en pluraj publikaj foiroj dum la jaro)

- VB raportas pri Esperanto-semajno en Strasburgo: en ĉiu tago de la semajno estas proponita evento (kuirado, prelego, koncerto, ktp)

- MPS raportas ke ŝi ekaŭdis pri Eo kiam 17-jara en Kanarioj kaj nur multe pli poste decidiĝis lerni la lingvon.

- FBe priskribas la agadon por Esperanto plu pionira; utilas subskribigi la peticion por Eo en abituro (<http://esperanto-au-bac.fr/> jam kolektiĝis pli ol 20 000 subskriboj)

- LE : plu estas subskribiloj sen subskribokampo; sugesto traduki libron de la Indignantoj. FBe precizigas ke la verko de Stéphane Hessel «Indignu» jam estis kolektive tradukita kaj eldonita

- **Konklude:** estas proponite okazigi aŭtunan kaj printempan (eventuale koincide kun «Le Monde à Montpellier») semajnojn. Martine Ragonnet kunordigos (aliĝis al la laborgrupo VB JB ME SE Olivier LE)

- Tradukenda estas malferma letero de speleologoj kontraŭ elfosado de ŝistaj gasoj (jam ekzistas france kaj angle)

- FBq: estas tradukata «On a marché sur la lune» (tinĉja aventuro)

8 Aŭtuna kunveno

Loko: Montferrier. Dato: 20a aŭ 27a de oktobro preciziginda antaŭ la 30a de junio.

9 Diskutgrupo ĉe jahuo

VB : ĉu reaktivigi ? Ĉu funkciigi ĝin malferme ? Risko de trudmesaĝoj ekster la interesiĝoj de la regionanoj. Relanĉenda cele de la planata Eo-semajno.

10 Staĝo en Béziers

- LE : 1-taga staĝo kun gvidanto. Turismaj ofertoj : informi najbarajn ferderaciojn. Akiri flagojn kaj standardojn de Espéranto-France.

11 Cifereca projekciilo

Federacio aĉetu ciferecan projekciilon por uzo de rondvojaĝantaj prelegantoj kaj ĉiuj aliaj okazoj (kunvenaj prelegoj, staĝoj, kursoj, ktp)



12 POSTTAGMEZE

- Bildprezento fare de AL pri Vikipedio, tre rimarkinda fenomeno de la lasta jardeko en kiu Esperanto okupas rimarkindan lokon: (kio ĝi estas, la loko de Esperanto en ĝi, kial kaj kiel partopreni)

- Lotumado: JFP eligis la numeritajn ĵetonojn. Gajnantoj povis elekti inter libroj kaj aliaj Esperantaĵoj.



NOVAĴOJ EL NIAJ GRUPOJ

CENTRE CULTUREL ESPERANTO DE MONTPELLIER

S-no Reine Celiqua Le Saint-Hubert B44 31, Rue des Chasseurs 34070 MONTPELLIER

Contact, courrier : S-o Serge Eysseric 689, Chemin du Mas de l'Huile
34980 MONTFERRIER-sur-LEZ

ĜENERALA ASEMBLEO DE LA 17-a DE MARTO 2012

Post la bonveno al ĉiuj (16 ĉeestantoj), la prezidanto malfermas la asembleon.

Senkulpiĝis Rosa Aumeunier, Hanna Cayzac, Adrian Dreschmann, Jacqueline Dumas, Louis Ensuque, Georges Gonthier, Alice Helbrunner, Jean-Marie Lot, Maria Perez y Sanz, Claudine Poncy.

1. La prezidanto prezentas LA RAPORTON KONCERNE LA AKTIVECOJN de la C.C.E-o.

1.1. Okazis 9 monataj kunvenoj, ĉiam multe vizitataj ; la Zamenhofa-Tago, en decembro, estis tre vigla kaj agraba : skeĉoj, muziko, kantoj, lumbildoj.

1.2. Tre regule funkcias la kursoj :

- en l'Escoutaire, du kursoj, jaŭde matene : komencantoj, progresantoj ;

- en Georges Brassens, rondo-babilado por progresantoj, kutime 7 personoj, kelkfoje 9 ;

- en Montferrier, 6 progresantoj.

1.3. Interasocia Renkontiĝo de E-o ĉe Mediteraneo (I.R.E.M.) en

Sète, dum la finsemajno de Pasko 2011. Pluraj el ni laboris por la organizado kaj la bona disvolviĝo de tia impona renkontiĝo, kiu kunigis proksimume 400 personojn : multaj prelegoj, ekskursoj, spektakloj ; ekzamenoj laŭ la Eŭropa Referenc-kadro : granda sukceso (20 partoprenis je la nivelo B2, 30 je la nivelo C1 ; la plej alta nivelo estas la C2). El nia grupo, nur Josée partoprenis kaj sukcesis la C1-on : gratulojn !

1.4. Asociaj Foiroj, meze de septembro, en Montpellier kaj Montferrier : kutima ĝoja etoso, multaj vizitantoj (kelkaj donas sian adreson) sed fine neniu esperantiĝas.

1.5. Rosa Aumeunier kaj Jean-Marie Lot partoprenis en la U.K. en Kopenhago, fine de julio 2011.

1.6. Grava afero, la peticio por la « Espéranto au bac » ; en Montpellier, nia samideanino Corinne Daudier rikoltis pli ol 1000 subskribojn (en Francio, nun, proksimume 20000). Oni povas ankoraŭ subskribi ĝis la fino de aŭgusto 2012.

LA RAPORTO PRI AKTIVECOJ ESTAS UNUANIME APROBITA.

2. LA FINANCAN RAPORTON prezentas la kasistino, Reine Céliqua. Ŝi disdonas fotokopiojn pri enspezoj kaj elspezoj (vidu folion).
LA FINANCA RAPORTO ESTAS UNUANIME APROBITA.

3. DISKUTO PRI KELKAJ AFEROJ.

3.1. La prezidanto de la E-a Federacio Langvedoko-Rusiljono, Jean-François Passarella, petis al nia grupo plialtigi la kotizon je 2 eŭroj por finance partopreni al la Federacio. Tio naskas malfacilaĵon, ĉar la artikolo 4-a de niaj statutoj malpermesas la aliĝon de la C.C.E-o al ia ajn asocio : estas necese trovi solvon. Longa diskuto : ĉu modifi la statutojn ? ĉu ĉiu samideano volas pagi tiun kontribuon, libervole sed ne devige ? Koncerne ĉi tiun jaron, la dua solvo estas konsentita.

3.2. Alia propono : ĉu la kotizo de la studentoj aŭ de la senlaboruloj devas esti la plena kotizo ? Propono : ĉu elekti la duonkotizon ? Nenion oni decidis.

3.3. Pri S.F.S., oni povas ricevi la revuon laŭ du manieroj, do laŭ du kostoj, rete : 2 eŭroj, papere : 8 eŭroj. Do, pagu laŭ via elekto (memoru, ni faris demandon al vi pri tio antaŭ kelkaj monatoj).

4. ELEKTO DE LA NOVA ESTRARO.

4.1. Dum la lasta jaro, la estraro estis tia : s-inoj Jeanne Bès, Josée

Boccadifuoco, Hanna Cayzac, Reine Céliqua, Monique Eysseric, Annick Tora ; s-oj Serge Eysseric, Jean-Marie Lot (laŭ la statutoj, inter 6 kaj 10 membroj).

4.2. En la estraro, estis : prezidanto Serge Eysseric, vic-prezidantino Josée Boccadifuoco, kasistino Reine Céliqua, sekretariino Monique Eysseric.

Pri la estraro: , en februaro la kasistino kaj la prezidanto petis esti anstataŭataj : post longa interŝanĝo de demandoj kaj respondoj, de argumentoj favore al tia aŭ alia solvo, Josée Boccadifuoco konsentas al la propono prezidi la C.C.E-o-n.

KANDIDATECO APROBITA, UNUANIME MALPLI UNU VOĈO.

Serge Eysseric akceptas la vic-prezidantan postenon.

Koncerne la kasistan postenon, neniu konsentas anstataŭi la aktualan : Reine Céliqua konsentas daŭrigi la oficon, sed nur dum unu plia jaro.

NOVA ESTRARO :
PREZ-INO JOSEE BOCCADIFUOCO,
VIC-PREZ-O SERGE EYSSERIC,
KASISTINO REINE CELIQUA,
SEKRETARIINO MONIQUE EYSSERIC

5. VENONTAJ AGADOJ en 2012.

5.1. Venonta federacia kunveno: 31-an de marto.

5.2. Antaŭkalkula buĝeto. Vidu apartan folion.

5.3. « Le Monde à Montpellier », ex -Montpellier International (vidu la lastan protokolon, februaro 2012) : unua renkontiĝo de asocioj, koncerne la fremdulojn loĝantajn en Montpellier : Rusojn, Gvineanojn, Italojn, Hispanojn, Madagaskarojn, ktp, kaj Esperantistojn ! Nia samideano Olivier, Olivarbo, delegita de nia asocio, informas, ke la evento okazos la 24-an de marto en la «Maison des Relations Internationales » : modesta renkontiĝo ĉi-jare, elmontrado de fotoj, dokumentoj,...

5.4. Projekto de ekskurso en la Sudaj Alpoj dum la semajnfino 23-an-24-an de junio. La tutan programon vi legos en la venonta S.F.S.

5.5. Turneo de esperantistoj en Francio : de la 30-a de septembro ĝis la 3-a de oktobro 2012, nia grupo akceptos s-inon Anna Lowenstein, faman verkistinon (memoru *La ŝtona Urbo, Morto de artisto*, romanoj pri la romia historio, verkitaj en Esperanta lingvo) kaj s-ron Renato Corsetti, faman esperantiston, kiu estis Prezidanto de U.E.A. Ni organizos renkontojn, prelegojn,...Ni anticipe ĝojas !

5.6. Anoncoj : nova horaro de la

kursoj de Joana Bony, venontan jaron en l'Escoutaïre.

Komencantoj: ĵaŭde, 9h30-10h30

Konversacio : ĵaŭde, 10h30-12h (Joana opinias, ke la partoprenantoj ne plu bezonas ŝin! Do nia samideano Olivarbo gvidos la kurson).

En la M.P.T. Georges Brassens, Joséé proponas ankaŭ ŝanĝi la horaron : marde, 16h30- 18h.

5.7. « Ĉerizo sur la kuko » ! Joana, solene, disdonas diplomon de unua nivelo al kvar klubanoj, kiuj trapasis ekzamenon en januaro : Martine, Diane, Olivier kaj André. Ĉiuj aplaŭdas !

Post kelkaj semajnoj, ili trapasos la duan nivelon. Bonŝancon !

ONI DEKLARAS LA Ĝ.A.-ON FINITAN JE LA 12-A H KAJ KVARONO.

Do, grava Ĝ.A., brua kaj vigla, okazo por ĉiu el ni sin esprimi.

Poste, ĝis pli ol la 14-a, bona, brua kaj vigla tagmanĝo : ĉiu montras sian kvaliton ankaŭ rilate al kuirarto.

Venontan monatan kunvenon, sabaton 28-an de aprilo. Memoru la postajn : 12-an de majo, 16-an de junio, ĉiam je la 10-a, ĝis la 14-a.

Bonan sanon al ĉiuj. Ĝis la revido.

La sekretariino

Abonnement au SFS pour 2012: Pour les membres de la fédération (cotisation 2,00 €)

- envoi gratuit de la version numérisée par internet (si vous n'avez jamais reçu SFS par le net ou avez changé d'adresse contactez le rédacteur xianmoure@orange.fr)
- envoi postal : 8,00€ (soit 10,00€ avec la cotisation) payable à votre groupe ou directement à notre trésorière : Maria PEREZ Y SANZ 13bis, rue Haute 30310 Vergèze. Vous recevez également la version numérisée si cela est possible.

Pour les non-membres

- uniquement par voie postale : 8,00€ sans version numérisée.

« Le Monde à Montpellier » 24-an de marto 2012

Estis interkultura renkontiĝo en « *la Maison des Relations Internationales* » de Montpellier ; la iniciantoj estas junuloj kape de eta asocio « Holdub », helpataj de la urbestro.

Estis oportuneco kunigi membrojn de diversaj asocioj, nur skizo de pli ambicia manifestacio, en la venontaj jaroj.

Estis invitita CCEM, feliĉa kapti tiun okazon montri sian ekziston & nia ĉijara partopreno ebligos venontan inviton.

Esperanto estas internacia movado, kulturo, kiuj tute taŭgas en la kadro de « La Mondo en Montpellier »

Ĉiuj disponis lokon por pendigi panelon (120 x 80), sur kiu estis indikitaj :

Landnomo Esperantolando
Terspaco 510 000 000 km²
Loĝantaro Pluraj milionoj da

esperantoparolantoj

Ĉefurbo Ĉiujare la urbo, en kiu okazas la UK (Universala Kongreso), ekz.: Boulogne-sur-mer en 1905, Montpellier en 1998 , Hanoi en 2012

Lingvo

Esperanto

Mono

Ĉiulanda mono

Etiko

Universala frateco

Ĉefa eksporto Espero

Abunda kaj franda pikniko ĝojigis ĉiujn en la parko.

Poste ni ĝuis spektaklon : moda parado de nordafrikaj kostumoj ; rusaj, afrikaj kantoj ; kurdaj, gabonaj dancoj ; poemoj honore al Burkina Faso ...

Fine, Olivarbo ne nur prezentis CCME-n sed ankaŭ kantis " Ho mia Kor' "-n laŭ persona muziko.

Agrabla, riĉa etoso ! Ni esperas partopreni venontan jaron.

Jeannine Bony



Ni proponas al ĉiuj geamikoj neforgeseblan promenadon sur la Suda Kanalo, sabato, la 2an de Junio 2012 (vidu praktikajn kondiĉojn en la fino).

La Suda kanalo

La Suda Kanalo estas rimarkinda konstrufako, kombinante estetikan kaj teknikan aŭdacon. Ĝi integriĝas larĝan ensemblon Atlantiko ĝis Mediteraneo inkludante:

- La Ĝirondo kaj la navigebla parto de la Garono;
- La flanka kanalo ĉe la Garono, de kie la rivero ne plu estas ŝipveturebla (*Castets*), ĝis Tuluzo;
- La Suda kanalo mem kiu ligas Garonon kun Seto;
- La Rodana Kanalo kiu ligas Seton al *St Gilles* kaj *Beaucaire*, laŭ la Rodano.

La ideo kunigi Atlantikon kaj Mediteraneon estas malnova; ĝi aperis en la komenco de la dekseca jarcento. La celoj estis:

- Promocii eksportadon de langvedokaj produktaĵoj;
- Interligi Tuluzon kaj Mediteraneon;
- Ne dependi de la reĝo de Hispanujo por komerci tra la Markolo de Ĝibraltaro.

Kompleksa hidraŭlika sistemo

La diversaj projektoj de kanalo ligante Mediteraneo al Garono ĉiam luktis kontraŭ granda defio: kiel transiri la *Naurouse* sojlon (inter *Villefranche de Lauragais* kaj *Castelnaudary*) 189 metrojn altan kiu apartigas la basenojn de Garona rivero (fluanta al la Oceano) kaj de *Aude* rivero (fluanta al la Mediteraneo)?

Tiu alteco ŝajnas malgranda sed ni ne devas forgesi ke oni startas de la mediteranea marnivelo!

Cetere, por transiri deklivon, kanalo transformiĝas en akvan ŝtuparon kies ĉiu paŝo estas interkluzejo. Ĝi estas konektita al la antaŭa kaj al la sekva per kluzoj. La kanalo bezonas sufiĉe da akvo ĉiusezone. Akvo nutras la supran interkluzojon de la "ŝtuparo". Fakte, ĉiu pasanta ŝipo en kluzo bezonas multe da akvo por navigadi de kluzoj en kluzojn.

Do male al nia opinio, la ĉefa malfacilaĵo ne estu fosi, aŭ eĉ realigi kluzojn sed nutri ĉiujn kluzojn per akvo. Ĉiuj Langvedokuloj scias ke, en nia regiono la akvo neniam estas tiel kiel oni bezonas: tro rara en somero, tro abunda dum kelkaj tagoj en aŭtuno!

Riquet brila kaj obstina entreprenisto

Pierre-Paul Riquet (1609-1680) metis sian tutan talenton, energion kaj monon en la realigadon de la kanalo.

Riquet estis la kontrolisto de sala impoŝto en Langvedoko : la Reĝo donis al li la taskon, kiu konsistis en la kolektado de impoŝtoj por la reĝa trezorejo. Tiutempe, la konfuzo inter personaj kaj ŝtataj financoj estis kompleta kaj oficiala!

Kiel « impoŝta kolektanto », *Riquet* vojaĝis ofte en la teritorio inter Mediteraneo kaj Garono. Li rimarkis ke la Nigra Monto estis plena da akvo tutjare. Sed necesis stoki tiun akvon en baraĵoj kaj fosi kanaletojn ĝis la supra interkluzejo. Fine, necesis konstrui havenon kie kanalo kaj Mediteraneo renkontiĝu.

Riquet proponis sian projekton al *Colbert* en 1662, kiu ĝin apogis ĉe reĝo Ludoviko la 14a.

Teamo estis formita ĉirkaŭ *Riquet*:

➤ *Hector de Bouthroue de Bourgneuf* kiu realigis la kanalon de *Briare*, la unua kanalo, kiu ligis du akvajn basenojn;

➤ *François Andreossy*, geometro kaj kartografo, kiu studis kanaletojn en Lombardio kaj Venetio;

➤ *Le chevalier De Clerville*, fakulo de fortikaĵoj kiu elektis lokon kaj konstruis havenon en Seto, kiu, antaŭe, estis nur modesta fiŝkaptista vilaĝo.

Gigantaj verkoj

Prezprojekto estis prezentita en Februaro 1666 : ĝi sumiĝis 5,262,000 pundojn!

Reĝa edikto rajtigis la projekton en

Oktobro 1666 kaj *Riquet* estis deklarita prezkonkuradulo. Li povos kolekti paspagojn sed li devos financi la projekton. La reĝa trezorejo promesis du milionojn da pundoj, la gubernio de Langvedoko konsentis kontribui ĝis 2,4 milionoj pundoj. Jen, estis la unua ekzemplo de kruca financado inter la ŝtato, provinco kaj privata entreprenulo!

Finfine, la ŝtato pagos 8,5 milionojn da pundoj, la Langvedoka provinco 8 milionojn kaj *Riquet* 4 milionojn. Kvarfoje la prezprojekton! Laboro komencis la 29an de Julio 1666 en la haveno de Seto ; la fosado de la nutra kanaletoj en la Nigra Monto komenciĝas en Januaro 1667 kaj la unua kluzo sube de Tuluzo en Novembro 1667.

Tiutempe la fosoj estis faritaj per homaj manoj, la elĵeto de elfositaĵoj kaj la alportado de materialoj uzis ĉarojn tiritaj de bovoj aŭ ĉevaloj. Kartografio estis malpreciza kaj oni devis vojaĝi centojn da mejloj sur ĉevalo por certigi surlokan konturon, altecon de monteto, fluon de rivero

La kanalo estas 254 km longa, entenas 26 kluzojn de Tuluzo ĝis *Naurouze* kaj 74 sur la Mediteranea flanko. *Riquet* elpensis kaj faris plurajn kluzojn, duoblajn (10), trioblajn (4), kvaroblan (*Castelnaudary*) kaj sepoblan (*Fontsérannes*, proksime de *Béziers*). Oni devis konstrui akvedukton (la

unuan en Francujo) per kiu la kanalo transiras riverojn. Oni traboris tunelon 160 m longan, la unuan por kanalo en la mondo, sub la monteto *Ensérune*. Por alporti akvon el la Nigra Monto ĝis la kanalo, li fosis kanaletojn, stokadajn baraĵojn (*St Ferréol kaj Lampy*), akveduktojn kaj tunelojn por atingi la supran interkluzojn.

Estetikaj konsideroj ne forestis el la konstruado de ĉi tiu utileca verko: nur vidi la estetikon de la kluzoj, elverŝejoj (forigo de la troa akvo), pontoj, akveduktoj, tunelaj eniroj, gardistaj domoj

Unesko metis la kanalon en la Mondan Heredaĵon en 1996.

Riquet estis sociala estro: liaj laboristoj (8000) estis pagitaj po monato, la labora tempo estis limigita kaj socia sistemo pagis malsanulojn kaj akcidentitojn.

La daŭrigo de la laboro de Riquet

Riquet mortis elĉerpita kaj ruinigita la 1an de Oktobro 1680. La unua oficiala navigado okazis de Tuluzo ĝis Seto inter la 15a kaj 25a de Majo 1681. La komerca trafiko nur komenciĝis en 1684. *Vauban* devis korekti multajn hidraŭlikajn misfunkciadojn.

Reto de kanaloj estis konstruita dum la dekoka kaj deknaŭa jarcentoj:

- La Kanalo de *Brienne* (1768-1776) kiu kunligas la Sudan Kanelon kaj la Garonan riveron;

- La Kuniga Kanalo (1777-1787) kiu atingas *Narbonne*
- La Kanalo de Rodano al Seto, kiu estis kompletigita en 1811;
- La Kanalo flanke de la Garono (1838-1856), kiu evitas la hazardajn kondiĉojn de navigado en la Garona rivero.

Dekadenco kaj reviviĝo

La kanalo spertis gravan trafikon dum dekoka kaj deknaŭa jarcentoj, sed perdis trafikon kiam oni malfermis la fervojon Bordoza-Tuluzo-Marsejlo dum la fino de la deknaŭa jarcento. Ĝi estis savita per la disvolviĝo de rivera turismo ekde la 60a jaroj. Nun, amaso da loĝeblaj ŝipoj vizitadas la kanalon, plejofte luitaj de fremduloj. Estas bedaŭrinde, ke la Langvedokuloj malofte uzas tiun verkon kiun ili mem financis!

Organizado de la ŝipado la 2a de Junio

Personoj kiuj venos de *Béziers* kaj de la ĉirkaŭaĵoj lasos aŭtojn en Quai Notre Dame, ĉe la enŝipejo « les Bateaux du soleil ».

Personoj kiuj alvenos aŭte de Montpellier, Nimo kaj ĉirkaŭaĵoj lasos aŭtojn en la fervoja stacidomo de *Agde* por eniri la trajnon de 8a 24 kiu alvenos en *Béziers* je la 8a 37. Poste ili uzos la urban buson numeron 9 de la stacidomo de *Béziers* je la 8a 54 ĝis *Quai Notre Dame*.

Antaŭ la enŝipiĝo, ni havos tempon por admiri la ŝtuparon da sep klusoj de *Fonsérannes*.

Nia boato ekiros je la 10a. Ni tagmanĝos sur la boato ĝuante la pejzaĝon el nekutima vidpunkto. Ni superiros la riveron *Orb* per kanala ponto, ni transiros la riveron *Libron* je nivelo tra tre kurioza vorko, kaj fine ni admiros la rondan kluzon en *Agde* kiu ebligas iri en tri malsamajn direktojn. Ni elŝipiĝos en *Agde* je la 16a, la elŝipejo estas proksime de la stacidomo.

Personoj kiuj revenos al *Béziers* por repreni aŭton entrainiĝos je la 17a 24, kaj atingos *Béziers* je la 17a 37, poste veturos per la urba buso numeron 9 je la 17a 54 kaj atingos je la 18a 34 la haltejon *Quai Notre Dame*.

La prezo estas 45 eŭroj ; ĝi inkludas la ŝipadon *Béziers-Agde*, la trajnon inter *Agde* kaj *Béziers*, la urban buson en *Béziers*, la vespermanĝon kun trinkaĵoj sur la boato.

Kiam vi rezervas, bonvolu doni partopagon je 20€.

La ŝipado estos Esperante komentita.

Rezervado

Nomo.....

Antaŭnomo.....

Akompanita de.....personoj.

Adreso.....

.....

.....

.....

.....

Telefona numero:

Interreta adreso :

Partopago:20€x.....personoj=eŭroj

Bonvolu sendi tiun rezervadon kun partopaga ĉeko:

Cercle culturel espérantiste nîmois

185 chemin du Mas Bonnet

30000 NÎMES

Tel 09 54 01 01 30

Interreta adreso:

Frederic.bourquin@laposte.net

TTT-ejo:

esperantonimes.wordpress.com

KIEN NI IROS ? Renkontiĝo de Kataluna Esperanto

Estimataj, La ĉi jara Internaciisma Renkontiĝo de Kataluna Esperanto-Asocio kaj Kataluna Esperanto-Junularo okazos la 29an kaj la 30an de junio kaj la 1an de julio, en Canet de Mar.

Proponoj kaj aliĝoj bonvenas. La retejo de la renkontiĝo estas: www.esperanto.cat/ir2012

Ĝis tuj en Esperantuj'

Farri

Kultura Esperanta Centro de
Montpellier

Tel : 04 67 59 80 13

Retadreso :

serge.eysseric@wanadoo.fr

PROpono DE FINSEMAJNA EKSKURSO

Dum la monato Junio, Monika kaj mi proponas organizi finsemajnan ekskurson en la Sudaj Alpoj por Esperantistoj, do ĉiĉeronota Esperante.

Mi jam organizis tiun ekskurson por la amikoj de la Asocio « Aqueduc » de nia vilaĝo Montferrier, sed, kompreneble, france.

PROGRAMO :

Sabato :

- Foriro je la 7-a de MONTPELLIER (aŭ de alia loko, laŭbezone, por aliaj partoprenantoj)
- Observejo de « SAINT MICHEL L'OBSERVATOIRE », prelego en la « siderostat » de loka fakisto, aŭ, se ne eblas (la « siderostat » estas prioritare uzita de la lernantoj de la departemanto) vizito de la Muzeo de la Olivarbo en VOLX.
- Abatejo de GANAGOBIE, pikniko antaŭ la belega vidpunkto sur la riverkruciĝo

Bléone/Durance, vizito de la preĝejo.

- La « Pentofarantoj » de Les MEES, giganta rokaj muro, prezentado de la geologia formado, promenado en la malnova vilaĝo kies domoj estas gluitaj al la rokoj. Ebleco por la kuraĝuloj trairi la rokojn tunele : stranga impresoj.
- Vespermanĝo kaj tranoktado en hotelo en DIGNE. (por la amikoj de Montferrier, post la vespermanĝo, mi prelegis pri « la Kanto de la Pulsaro »).

Dimanĉo :

- Vizito de la fama « Dalle aux Ammonites », kie mi donos klarigojn pri la stranga deveno de tiu ŝtonplato.
- Muzeo de la « Geologia Rezervejo de la Sudaj Alpoj », internacie konata.
- Tagmanĝo je la restoracio de la golfejo de DIGNE (aŭ pikniko)
- Posttagmeze vizito de la konstruejo de la plej granda suncentralo en Francio : aktuale jam pluraj dekoj da hektaroj da fotoceloj (aŭ sunpiloj), fine 2 centoj da hektaroj kies potenco estos 100 megavatoj !
- Revenante, oni preterpasos la faman Nuklean Centralon de CADARACHE, en kiu oni konstruas la « Tokamak ITER » artefarita suno. Mi povos, se vi

volos, iomete paroli pri atomenergio, fisio kaj fuzio.

- Alveno en MONTPELLIER je la 20-a.

TRANSPORTA RIMEDO :

Oni povas uzi por vojaĝi individuajn aŭtojn kaj organizi « kun-

veturadon » aŭ lupreni buseto(j)n. Lupreni buson estas multe kosta kaj malfacila, pro iuj mallarĝaj vojoj.

Prezo

Mi opinias ke la prezo povas esti pli malpli 100 eŭrojn por 2 tagoj.

Serge EYSSERIC

Mortis René Bénazet

Dum multaj jaroj li gvidis superan kurson de Esperanto en Perpignan, ankaŭ en Argelès-sur-Mer, tie eĉ per radio. Profesie, li antaŭe instruis la hispanan lingvon en Argelès.

En “Parolas veterano” (24-paĝa broŝuro (1997) kiu origine aperis kiel suplemento enŝovita en la 129-a numero de “Laŭte !”) Leo Lentaigne skribis :

“En oktobro 1947 mi akiris permeson gvidi kurson en la

porinstruistaj lernejoj. Al la gejunuloj mi anoncis, ke mi planas organizi vojaĝon por ili, se ili akiras la elementojn de la lingvo”. Sekve, Lentaigne akompanis 24 junajn personojn : unue, en kampadejo apud Doorn; due, en Amsterdamo, kie disvolviĝis la 21-a kongreso de S.A.T. en aŭgusto 1948. Inter ili estis la geedziĝonta paro Bénazet, kiu ĉiam restis fidela al Esperanto.

Jean Amouroux



En sidejo, 72 Avenue Général de Gaule en Perpignan. René Bénazet, Charles Gérard, René Llech-Walter

L'œuvre créatrice de Zamenhof comporte un aspect oublié ou raillé, l'homaranismo. A une époque où on parle, à tort et à travers, de conflits entre les religions, il est intéressant de revoir avec nos yeux du XXI^{ème} siècle cette création originale.

Au-delà d'un simple outil d'intercommunication, Zamenhof pensait que sa langue véhiculait une « idée interne », un idéal de paix, de justice, de tolérance et de fraternité.



En 1901, il fait paraître en russe un petit livre intitulé *Hilléisme* qu'il signe *Homo Sum*. Ce pseudonyme est inspiré d'un vers de

Térence (poète comique latin vers 185-159 avant J.C.) sur le sentiment de la solidarité humaine : *Homo sum : humani nihil a me alienum puto* (*Je suis homme : je pense que rien d'humain ne m'est étranger*).

Zamenhof y livre ses réflexions sur l'enseignement d'un rabbin de Babylone, Hillel l'Ancien (Babylone vers 70 avant J.C. – Jérusalem 10 après J.C.) dont l'interprétation libérale de la Loi se heurta à celle, très rigoriste de Shammaï : « *Aimez la paix, répandez-là, aimez les hommes [...]* Si ne prends pas soin de toi, qui prendra soin de moi ?

Mais, au contraire, si je ne pense qu'à moi, quel homme suis-je vraiment ? [...] Ce qui est haïssable pour toi, ne le fais pas à ton prochain, telle est la Loi. », telle était la Règle d'Or d'Hillel.

Zamenhof n'était pas un juif croyant et pratiquant mais plutôt un libre penseur. D'abord proche des mouvements sionistes, il s'en était éloigné, craignant leur extrémisme. Dans une lettre adressée en 1905 à l'avocat Michaux, il écrit que l'hilléisme consiste « à créer un pont moral capable de relier fraternellement tous peuples et toutes religions sans créer de nouveaux dogmes et sans qu'aucun peuple n'ait besoin de répudier sa religion actuelle » et « une unité religieuse qui embrasserait dans sa paix et réconcilierait toutes les religions existantes ».

Il définit un *Credo* : « *Je suis homme et les seuls idéaux qui existent pour moi sont ceux qui sont purement humains, proclame notamment l'hilléiste [...]* Il est de mon devoir d'œuvrer à la disparition de tous les idéaux raciaux et nationaux [...] Je crois que tous les peuples sont égaux, que chacun a le droit de parler la langue qu'il veut et de pratiquer la religion de son choix, mais que, pour communiquer avec son prochain, il devrait, autant que faire se peut, employer une langue neutre, toute tentative d'imposer à d'autres ses propres langue et

religion étant un acte de barbarie [...] Ma religion est celle de ma naissance, mais à son nom j'ajoute le mot « hillélisme » pour montrer qu'elle est en accord, selon moi, avec les principes de l'hilléisme, à savoir :

- Je reconnais l'existence de Dieu, chacun ayant toute liberté d'interpréter ce pouvoir supérieur comme il l'entend ;

- La règle fondamentale de ma religion est : " comporte-toi envers les autres comme tu voudrais que les autres se comportent à ton égard et écoute toujours la voix de ta conscience " ;

- Je suis conscient que chaque être humain professe une religion non pour l'avoir librement adoptée mais pour l'avoir reçue du milieu dans lequel il est né et que toutes les religions sont fondées sur des principes communs ; en conséquence, je suis conscient que personne ne peut être jugé pour son appartenance religieuse et que ses actes, bons ou mauvais, ne peuvent être attribués à sa religion mais à lui-même et aux circonstances de sa vie. »

Sa grande idée était de séparer les commandements ou les ordonnances des religions en deux catégories :

- la première regroupe les commandements de Dieu même, inscrits « dans le cœur de chaque homme sous la forme de la conscience » que l'on peut retrouver,

sous sa forme synthétique, dans la *Règle d'Or*, le principe de Hillel.

- La seconde se compose d'un ensemble constitué de la sagesse, des mythes et légendes et des principes moraux conformes à la croyance de chaque individu.

Mais, craignant que les connotations juives de l'hilléisme ne l'enferment dans un dogme à l'usage des seuls juifs du ghetto, Zamenhof le rebaptise en 1913 *Homaranismo*.

Ce nom est en espéranto qui, étant une langue agglutinante et isolante, peut créer facilement des mots nouveaux par juxtaposition de racines:

Hom'ar'an'ism'o : *Hom'o* : l'Homme, (qui donne l'adjectif *hom'a* = humain) ; *Ar'o* : groupe ; *An'o* : adepte ; *Ism'o* : doctrine.

L'*homaranismo* n'aura guère de succès et se heurtera même à une franche hostilité des rabbins et même de certains espérantistes.

En effet, la plupart ne voient dans la langue internationale qu'un outil pratique de communication et rejettent ce qu'ils considèrent comme une manifestation déplacée de mysticisme du vieux maître. On pourrait les qualifier d'*espérantophones*.

D'autres défendent « l'idée interne », qui est une forme dépouillée de toute connotation religieuse pour éviter que l'*espérantisme* ne soit rangé parmi les mouvements sectaires. Enfin, les espérantistes regroupés au sein de

SAT Amikaro retiennent parmi les apports de Zamenhof l'anti-nationalisme et l'espéranto comme la langue du prolétariat de tous les pays.

Actuellement, il n'y a plus guère de propagandistes purs et durs de l'*homaranismo*.

Les *bahá'i* (ou *bábí*) considèrent cela d'un autre œil. La foi bahá'ie a été créée au XIX^e siècle en Perse par Bahá'u'lláh (1817-1892). D'abord peu nombreux, ses adeptes seraient actuellement, malgré les persécutions, plusieurs millions à travers le monde.

Cette foi présente de nombreuses similitudes avec l'*hillélisme* et l'*homaranismo*. Il s'agit de dépasser les conflits raciaux, religieux et sociaux grâce à des principes moraux et philosophiques qui proclament le caractère nécessaire et inévitable de l'unification du genre humain. Le fondateur souhaitait une langue auxiliaire internationale qui préserverait les cultures et langues nationales. Son fils, Abdu'l-Bahá, ayant appris l'existence de l'espéranto, préconisa son utilisation. De nombreux *bahá'i* apprirent l'espéranto et, juste retour des choses, la fille cadette de Zamenhof, Lidia, adhéra à la foi bahá'ie et traduisit en espéranto les conférences parisiennes d'Abdu'l-Bahá.

Pour Zamenhof, la langue internationale et l'*homaranismo* formaient un ensemble cohérent

permettant d'abolir les barrières entre races, nations, langues et religions avec pour objectif l'établissement de la paix.

Zamenhof était-il trop en avance sur son temps ? Ou bien était-il un incorrigible utopiste ?

Le problème de la compréhension entre êtres humains de langues et de religions différentes subsiste et même s'aggrave. Les solutions linguistiques et philosophiques préconisées par Zamenhof sont-elles toujours adaptées ? Chacun en jugera.

Frédéric Bourquin

Président du cercle culturel
espérantiste nîmois

Bibliographie

En français : *L'homme qui a défié Babel*, René Centassi et Henri Masson, Éditions Ramsay, Paris 1995.

En espéranto : *Vivo de Zamenhof*, Edmond Privat, The esperanto publishing Co Ltd, Chorleywood, Rickmansworth, Hertshire, Grande Bretagne 1967.

Nekonato : *la Zamenhofa Homaranismo*, André Caubel, Cercle espérantiste de l'Agenais, Laŭte 47340 Laroque Timbaut 1985

PS : ceci est un extrait d'un article plus complet sur l'œuvre de Zamenhof publié le 7 novembre 2011 sur les blogs

<http://www.garriguesetsentiers.org>

et

www.esperantonimes.wordpress.com

Birobiĝano !

Tiu vorto, kiu titolas artikolon verkitan de Marel Halter, juda verkisto, en la ĵurnalo « Match », kiun mi foliumas ĉe la frizisto, okulfrapas min.

Birobiĝano ! ...Tie loĝas mia rusa korespondanto, kiu multe rakontis al mi pri tiu regiono. Mi tiam memoras : Li parolis iun tagon pri franca televidila teamo, kiu vizitas lian urbon, poste la Kanalo France 2 diskonigos en Francio la elsendon.

- Rigardu ĝin, li konsilis al mi ; tion mi plurfoje sensukcese provis. Mi rezignis kaj tute forgesis.

Hodiaŭ do, kvar jarojn poste, mi ne kredas al miaj okuloj ! Du longaj paĝoj kaj pluraj fotoj rilatas pri tiu stranga rusa regiono. Mi scivoleme ĵetas min en legadon de la dokumento, en kiu mi retrovis detalojn kaj klarigojn diritajn de Eŭgeno mia korespondanto. Fakte la televida elsendo okazis hieraŭ post la vespermanĝo sur la kanalo F5. Imagu mian bedaŭron eksci tro malfrue tiun eventon!

Birobiĝano estas iu juda autonoma respubliko sur la riverego Amour vidalvide al Ĉinio. La jida estas oficiala lingvo. Kiam la bolŝevika revolucio ekkomencis (1917) la judoj estis proksimume 5 000 000 en la tsara ŝtato, diras la aŭtoro.

Enfermitaj en restadejaj zonoj, ne akceptitaj sine de la Administracio, kaj lernejoj, tamen ili organiziĝis

kreante siajn proprajn lernejojn kaj sindikatojn.

Sed ekde la jaroj 1920-1930 post la unua monda milito, ili estis agnoskataj de bolŝevikaj komisaroj. Tiam oni retrovis ilin en ĉiuj instancoj de la nova Rusio, en politiko, gazetoj, literaturo kaj kinejo, teatro kaj plastiko. El la plej famaj ni citu : Sergueï Eisenstein, Boris Pasternak, Marc Chagall...

Kiam en 1934 Staline komencis trovi tiujn amikojn tro videblaj kaj aktivaj, li havis ideon. Kial ne doni al Judoj iun respublikon, iun aŭtonoman regionon same kiel al ĉiuj popoloj de URSS? Tio permesus al Regpotenco intrige forpuŝi ilin sen akuzado de antisemitismo. La Judoj gajiĝis pri tiu projekto. Ili esperis Kaŭkazon, ili ricevis parton de Siberio. Tiu nova regiono nomiĝas Birobiĝano !

La aŭtoritatoj forpelis milojn da judaj familioj. Multaj memvole foriris.

15 jarojn post la milito, la persekutadoj en Eŭropo kaj en la parto de Rusio okupita de nazioj, instigis ankaŭ milojn da Judoj al Birobiĝano (tiun Israelon de Siberio, kiel kelkaj personoj tiam nomis ĝin). La kultura vivo disvolviĝis, ankaŭ agrikulturo kaj konstruado de isboj.

En 1953, la morto de la Mastro de Kremlin malfermas la pordojn de Birobiĝano. La sovetiaj judoj multnombro foriris al Israelo.

En Birobiĝano nune en lernejo oni lernas la jidan.

Rigardante la fotojn ilustrantaj la artikolon ho ! surprizo ! mi rekonas mian korespondanton.

Esperanto estas vera miraklo, kiu kapablas pliproksimigi homojn tra la mondo, homojn kiuj tre bone kompreniĝas.

Jacqueline Dumas

TIBOR SEKELJ

tria parto (fino)

el http://eo.wikipedia.org/wiki/Tibor_Sekelj

Poligloto

Tibor Sekelj estis konata kiel poligloto. Li lernis ĝis bona uzgrado kaj povis paroli en diversaj periodoj entute tridekon da lingvoj. Naŭ el ili li konservis vive kaj aktive ĝis la vivofino : [hungara](#), [serba](#), [germana](#), [esperanta](#), [itala](#), [angla](#), [franca](#), [hispana](#), [portugala](#). Nur en tri, nome la hispana, Esperanto kaj la serbokroata, li verkis – eĉ ne en la gepatra hungara, ĉar li ne konis ĝin sufiĉe por verkaj bezonoj. Li ofte ankaŭ interpretis inter diversaj lingvoj dum siaj vojaĝoj kaj ankaŭ poste dum sia agado por [PIF](#) dum akceptoj, aranĝoj ktp.

« Mi lernis ĉirkaŭ 25 da lingvoj. Multajn mi forgesis, ĉar mi ne plu uzis ilin. Mi sukcesis daŭre memori 9 da lingvoj kiujn eĉ nun mi parolas. Tiuj 9 da lingvoj ne sufiĉas por tuta mondo, sed la plejparton de la mondo mi povas viziti kaj komuniki. »

Intevjuo kun Stipan Milodanoviĉ

Esperantisto

La tutan vivon de post sia esperantistiĝo en Zagrebo en 1930 li estis fidela al Esperanto. Liaj poresperantaj agadoj estas enormaj.

Li fondis dekon da landaj Esperanto-Asocioj en Sudameriko kaj Azio kaj E-societojn en kvindeko da urboj ĉie tra la mondo.

Li estis pli ol 20 jarojn komitatano de UEA kaj ĉefmerita por la dua rezolucio de UNESKO pozitive traktanta Esperanton en 1985. Li skribis trionon de siaj verkoj originale en Esperanto. Li skribis multegajn artikolojn por tre diversaj E-gazetoj kaj revuoj kaj li redaktis geografian Revuon, E-Gazeton kaj Velon. Sed lia revolucia poresperanta agado rilatis al lia fondo kaj gvido de Internacia Instituto por Oficialigo de Esperanto (IOE) kiu lanĉis la sloganon « Pli bona praktiko ol 100-hora prediko » tiel postulante pli malferman agadon de Esperantistoj. Kadre de tio li aparte engaĝiĝis en sfero de turismo kaj organizis aron da aranĝoj kaj aŭtobusaj karavanoj tra la mondo. Tiu agado havis kiel la plej valoran kosekvencon la startigon de [Pupteatra Internacia Festivalo](#) (PIF) en Zagrebo kaj iom pli poste la fondon de Internacia Kultura Servo. PIF ekzistas ankoraŭ nuntempe post 44 jaroj kaj distribuas ĉiujare premion « Tibor Sekelj » por la plej

homama mesaĝo. Lia tre intensa agado kadre de IOE influis grave al la ŝanĝo de klasika neŭtrala E-movado unuflanke al praktika apliko (kiel en kulturo kaj turismo) kaj aliflanke al pli elasta koncepto de neŭtraleco kiun sekvis [TEJO](#).

Lia slogano por la sukceso: « Por sukceso necesas tri aferoj: precize difini la celon, ekiri al ĝi kaj persisti ĝis la fino. »

Edukisto

Li ankaŭ influis al pedagogio de Esperanto. Li merite oni lanĉis la unuan televidan kurson de Esperanto en Ĉinio en 1980aj jaroj, li verkis kelkajn lernolibrojn. La aŭtoroj estis A. kaj T. Sekelj kaj la ilustraĵojn faris Klas Aleksandar kaj Novak Koloman. Ĝi ekzistis ankaŭ en formo de diapozitivoj - fakte filmstrioj - projekcieblaj. Li mem gvidis amason da E-kursoj ĉie kie li vojaĝis kaj interalie ankaŭ kunpartoprenis en la plibonigo de la Zagrebmetoda lernolibro. Tibor Sekelj kiel edukisto efektivigis inter 7000 kaj 8000 prelegoj, plej ofte kun diapozitivoj pri siaj vojaĝoj, verkis sennombrajn artikolojn inter kiuj treege ofte pri Esperanto en nacia gazetararo kaj estis intervjuata plurcentfoje por naci-lingvaj radioj, gazetoj kaj televido kaj ĉiam li ankaŭ informadis pri Esperanto.

Mondkoncepto

Ĉie kie li estis li klopodis dum siaj prelegoj kaj agadoj influu la homojn kompreni lian simplan vivofilozofion: Homo kiel individuo estas la plej valora estaĵo en sia ĉirkaŭo kiun

li plej bone konas senkonsidere pri sia deveno aŭ instruiteco (Tion plej evidente esprimas lia verko « Kumeŭaŭa ») kaj homo kiel kulturestaĵo socia estas produkto de la tuta homaro ĉar en ĉiuj liaj ĉiutagaj funkcioj kunpartoprenas produktoj kiujn inventis tre diversaj popoloj; li tion kutimis ilustru per manĝotablo klarigante ke ĉiun el la manĝilaroj inventis iu alia popolo, ke ĉiun el la manĝaĵoj unue evoluigis kaj plantis iu alia popolo kaj ke nur jam ĉe la tablo kunpartoprenas plurdeko da kulturoj. Tial por li ĉiu homo estis estiminda unuopulo kaj ĉio kion ni havas estas rezulto de la klopodoj de ĉiuj popoloj kaj sekve apartenas al ĉiuj. Tiu humanisma filozofio evidente ne estas ankoraŭ komprenata kaj estas ege necesa en la nuna profitema kaj posedobsedita socio.

Artisto

Tibor estis krom verkisto – do literaturartisto - ankaŭ pentristo kaj skulptisto kion li ankaŭ lernis en Zagrebo dum sia studotempo. Dum sia komenca vivperiodo en Argentino li vivtenis sin interalie per desegnado de portretoj kaj poste li ofte mem ilustris siajn librojn.

Verkisto

Tibor estas inter la plej grandaj originalaj E-verkistoj el la vidpunkto de lia konateco en neesperantista mondo, eble la plej fama, sekve laŭ la nombro de liaj tradukitaj verkoj el Esperanto. La plej sukcesa lia literaturaĵo « *Kumeuŭa - la filo de ĝangalo* » estas tradukita al trideko

da lingvoj de preskaŭ ĉiuj kontinentoj kaj pluraj aliaj al du ĝis dek lingvoj. Li verkis originale en tri lingvoj: Esperanto, hispana kaj serbokroata. El lia plumo naskiĝis trideko da diversaj volumoj, ĉefe vojaĝpriskribaj eseoj, romanoj, rakontaroj kaj poezio. Eĉ kelkaj kuriozaĵoj. Kaj ĉiuj ili havis centon da eldonoj en diversaj lingvoj.

La plej sukcesa lia libro estas « Kumeŭaŭa – la filo de ĝangalo » (origine verkita en Esperanto) ne nur pro tio ke ĝi estis plej multe tradukata (ĝi aperis krom en Esperanto en 22 lingvoj kaj estis tradukita al kelkaj pliaj kiuj eble iam aperos) sed ankaŭ pro tio ke ĝin la Japana ministerio por edukado proklamis en 1983 kiel unu el la 4 plej bonaj junularaj literaturaĵoj

aperintaj tiujare en Japanio kaj estis rekomendita al la junularo. Pro tio ĝi aperis en la japana je 300.000 ekzempleroj, verŝajne en plej granda kvanto en kiu iam ajn aperis libro tradukita el Esperanto kiel lingvo de originalo. Ĉiuj versioj kaj ĉiuj eldonoj de Kumeŭaŭa aperis je unu miliono da ekzempleroj.

« Tempesto super Akonkagvo » estas ankoraŭ lernolibro pri alpinismo en kelkaj Sudamerikaj landoj. Laŭ ĝia disvastigiteco videblas ke ĝi estas libro kiu plaĉas al ĉiuj generacioj en ĉiuj partoj de la mondo. Aro da liaj noveloj gajnis premiojn de [Belartaj Konkursoj](#) kaj lia poezio kvankam malmulta estas ege valora kaj studinda.



Activité des espérantistes de Lozère

Bonjour à tous les espérantophiles, La revue ESPERANTO-info de mai-juin sera expédiée cette semaine. Et comme d'habitude, la revue regorge d'articles montrant des activités des espérantistes en France et à travers le monde. Je rappelle que cette revue d'information est faite pour les francophones pour faire connaître la langue internationale et pour inciter les sympathisants à adhérer à une des associations espérantistes. C'est la revue que vous pouvez trouver sur le site : <http://www.esperantoinfo.info>

Et pour ceux qui ne sont pas abonnés ou qui ont du retard, vous pouvez payer par chèque dès aujourd'hui ! Abonnement d'un an : 20 euros pour six revues.

ESPERANTO-info 48210 MAS SAINT CHELY 04 66 48 58 48

Amicalement. Francis BERNARD président de l'association ESPERANTO-info

Le multilinguisme au baccalauréat

Dans le projet *Chatel* de réduction du nombre de langues au bac, **d'une cinquantaine à 24**, les langues retenues seraient :



- Les 12 langues européennes : *allemand, anglais, danois, finnois, espagnol, italien, grec moderne, néerlandais, norvégien, polonais, portugais, suédois.*
- Les 4 langues internationales : *arabe, chinois, russe, japonais.*
- Les 8 langues régionales : *basque, breton, catalan, corse, créole, langues mélanésiennes, langue d'oc, tahitien.*
- Actuellement : *Le bulgare, le cambodgien, le finnois, l'hindi, le hongrois et le slovaque* (sont présentés) par moins de 50 candidats, douze langues sont présentées par moins de vingt candidats par an: *l'amharique, le danois, l'estonien, le haoussa-indonésien, le malais, le laotien, les langues mélanésiennes, le lituanien, le macédonien, le slovène, le swahili et le tahitien.*

Jean HENIN

Réunion d'espérantophiles à Florac tous les mardis, dans une salle municipale. Neuf inscrits.

La radio locale 48FM a fait un reportage sur notre association. Alain RUNEL, Monique et moi sommes intervenus. L'émission est passée trois fois le samedi à midi durant le

mois de mars. (Je ne l'ai pas enregistrée!)

"La Fête des Peuples". Journée organisée par le curé de Mende, le 17 mars 2012. Il y avait des stands liés aux relations avec les peuples dont le stand espéranto. Plus de mille visiteurs. Amike. Francis

L'ESPERANTO A LA FETE DES PEUPLES

Samedi 17 mars 2012, les espérantistes du département de la Lozère, France, ont participé à la deuxième « Fête des peuples » organisée à Mende, la préfecture, en collaboration avec de nombreuses autres associations. Notre tout petit groupe d'espérantistes qui depuis l'automne dernier se renforce, y a tenu une petite exposition. Outre des affiches, et le drapeau des

Espérantistes « de la tuta mondo », une dizaine de livres en espéranto pouvaient être feuilletés. Nous y avons animé l'un des forums sur le thème « Quelles langues pour la communication internationale ? ».

"Espéranto-info" y a été diffusé, tout particulièrement le numéro qui expliquait les seize règles de grammaire de l'Espéranto. Au gré des discussions nous avons invité à

signer la pétition qui demande en France la reconnaissance de l'Espéranto en tant qu'option au Baccalauréat.

Au sein de cette fête qui voulait être « un temps de rencontre, d'échanges et de partages entre les personnes de différentes nationalités présentes en Lozère, ainsi qu'entre les associations de jumelage et associations de solidarité travaillant ici ou ailleurs dans le monde » nous proposons l'idée d'un pont qui permette d'échanger tout autour de la Terre, disons tout simplement de communiquer par-delà la diversité linguistique, sans dominer l'autre, pour mieux respecter et préserver toute la diversité culturelle.

Kolora festo, posttagmeza kaj vespera, kie muzikoj, kantoj, dancoj,

babiladoj, intermiksiĝis kun la milgustoj de la pladoj alportitaj de la partoprenantoj.

(Une fête colorée, le temps d'un après-midi et soirée, où musiques, chants, danses, réflexions et bavardages se sont mêlées aux mille saveurs des plats apportés par les participants.).



Jacques BELUCH

Helpu ankaŭ vi al Pasporta Servo!

TEJO renovigas, refreŝigas, senerarigas sian sistemon de Pasporta Servo: kaj rilate la retpaĝon kaj rilate la libron; Volontulaj helpantoj estas serĉataj. Ne temas pri volontula laboro por kiu vi devus forlasi vian laboron aŭ studojn por iom ajn da tempo, sed pri helpo de via propra hejmo! La laboroj estas divideblaj inter pluraj personoj kaj ili postulas ĉiu-semajne ĉirkaŭ 3-4 horojn. Post kandidatiĝo vi povas preparoli la

detalojn kun la koncerna persono. Jen la taskoj pri kiuj via helpo bezonatas:

- Grafikisto, sed nur profesia, kiu volontule laborus por renovigi kelkajn jam iom eksmodajn vidaĵojn en la libro.

- Respondanto de retleteroj koncerne al Pasporta Servo. Multaj personoj havas demandojn, kritikojn pozitive aŭ kelkfoje eĉ negative. La laboro povus funkcii multe pli efike, se vi

povus helpi organizi tiujn leterojn kaj respondi al ili.

- Map-faranto estus bezonata por refari eble modernigi la mapojn en la libro Pasporta Servo, laŭeble eĉ helpi pri la reta kunlaboro pri la interretaj mapoj.

- Helpo bezonatas ankaŭ koncerne la libro-kompiladon. Ni bezonus persono(j)n, kiu(j) povus redakti, kunmeti kaj reformi la libron Pasporta Servo, eble iom plibeligi, modernigi ĝin, aldoni kelkajn novajn ideaĵojn.

- Provlegado necesas antaŭ la publikigo kaj de la retpaĝo kaj de la libro. La provlegantoj havu sufiĉan lingvokonon, samnivela al B2 aŭ C1 nivelo laŭ Komuna Eŭropa Referenckadro.

- Programistojn ni bezonas. Estus utile por la retpaĝo de Pasporta Servo, se ĝi havus konstanta(j)n

programisto(j)n kiu(j) komprenas en la sistemo Drupal. La taskoj farendaj estas jam kolektitaj, kaj plejparte temas pri unuopaj taskoj, plenumebraj sendepende de aliaj.

- Kunordigado ankaŭ estas grava. La kunordiganto devos preni la respondecon al si atentante pri ĉies laboro.

Se vi volas agi por Esperanto, helpi al ni, kunlabori kun TEJO, modernigi nian Pasportan Servon, allogi pli da homoj por nia servo, prenu iun taskon. Ĉiuj bonvenas, ne nur gejunuloj! Jen eblo por bone elspezi vian tempon kaj aldoni eron al la Esperanta kulturo!

Kandidatiĝo ĉe:

pasportaservo@tejo.org kopie al oficejo@tejo.org.

<http://tejo.org/eo/node/1247>

fonto:Ret-Info <http://www.eventoj.hu>

Literatura Mondo peut être lu en ligne

Extraits du blog de Bernardo. L'Internacia Esperanto-Muzeo de Vienne offre des numérisations de nos périodiques les plus importants de la première période de l'espéranto, entre autres de La Revuo, Esperanto (UEA), de l'espérantiste britannique, allemand et polonais, Lingvo Internacia et Literatura Mondo. Sensationnel !...

La Esperantisto. - 1889-1895

Esperanto. - 1905-1946

Germana Esperantisto. - 1905-1935

Internacia Bulteno. - 1914-1918

Lingvo Internacia. - 1895-1914

Literatura Mondo. - 1923-1938

Pola Esperantisto. - 1906-1937

La Revuo. - 1906-1913

Remarque HM : il s'agit là, en effet de documents d'une grande valeur historique sur l'espéranto enfin accessible partout dans le monde à tout curieux ou chercheur. Y aura-t-il encore des intellectuels pour continuer à affirmer avec aplomb que l'espéranto est une langue sans passé, sans histoire, sans âme, sans littérature, sans poésie, sans chanson, sans humour, sans

expressivité, sans valeur artistique, intellectuelle, éducative, etc . ?

Suite à une proposition faire ce matin à László Szylvasi (Eventoj, Budapeŝto), l'original de l'"Enciklopedio de Esperanto" est maintenant téléchargeable en PDF depuis le site de la Scienca kaj

Teknika Esperanto-Biblioteko (STEB). Ça facilite considérablement les recherches. Une version HTML est maintenant accessible tout en bas de la page "Faka literaturo pri ĝenerala naturscienco kaj terminologio" avec la version PDF. Merci à lui !

TELESKOPO

Internacilingva Scienca Revuo, <http://www.teleskopo.com>

Teleskopo estas scienca revuo, aperanta surrete por publikigi internacilingve artikolojn pri diversaj sciencaj fakoj kiuj povas esti elŝutataj tute SENPAGE pere de kiu ajn komputilo konektita al interreto kie ajn tra la mondo. Redaktas: Dominique Vieira-Doktoriĝanto pri Historio ĉe Federacia Universitato de Goiás-Brazilo Por sendi al la revuo Teleskopo viajn opiniojn, demandojn, sugestojn, kritikojn kaj tiel plu, simple kontaktu nian redakton pere de la retpoŝtadreso:

redaktoro@teleskopo.com

Artikoloj en la tria eldono (= jaro 2011)

- Apertium kaj Esperanto-Enkonduko al peregrula maŝintradukado al kaj el Esperanto per malfermkoda platformo - Jacob Nordfalk kaj Hèctor Alòs i Font
- Aterosklerozo- Epidemologio, evoluo - Anthony Lucas
- Monografio pri la Gotha-letero de L.L. Zamenhof- La enigma odiseado de Zamenhofa letero - Bert Boon
- Pech Maho: Opidumo en Suda Gaŭlio - Arno Lagrange
fonto:Ret-Info <http://www.eventoj.hu>

Pri la neceso de Esperanta Retradio!

Kiu regule partoprenas en E-renkontiĝoj - kutime tio okazas unu-ĝis dufoje jare - povus kredi ke jam tio kondukas al bona regado de la lingvo. Kaj se tiu sama homo estas abonanto de iu periodaĵo en Esperanto, tiam tiu kredo povas eĉ esti pli granda. Tamen ambaŭ ne sufiĉas: La partopreno en unu aŭ du aranĝoj jare lasas grandajn tempajn

truojn dum kiuj oni ne aŭdas kaj ne parolas la lingvon. Legi oni ja povas dum la tuta jaro, sed la legado mem ne multe influas la parolkapablon. Por atingi fluecon de la lingvo necesas regule almenaŭ aŭdi ĝin. Tio ja eblis dum la pasintaj jardekoj se oni aŭskultis radioelsendojn en Esperanto. Bedaŭrinde en la epoko de la mallongondaj elsendoj la

plezuro kaj la sekva lernefiko estis minimumaj. Nur kiam la elsendoj disaŭdiĝis persatelite tio decide ŝanĝiĝis. Por mi tio estis vere granda paŝo antaŭen. Kaj kiam la elsendoj fariĝis ankaŭ aŭdeblaj en la interreto, oni povis aŭskulti ilin en la tuta mondo.

Do oni povus supozi ke ekde tiam la parolnivele en Esperanto grave pliboniĝis. Sed tio bedaŭrinde ne okazis. La diversaj elsendoj ne fariĝis sufiĉe popularaj por esti regule aŭskultataj de granda parto de la E-parolantoj. Tio havas laŭ mi du kaŭzojn:

Unue estas la enhavo de la elsendoj. Temis do pli malpli pri ŝtata aŭ religia propagando kiun oni volis nur jen kaj jen digesti aŭ estis ja E-temaj programoj kiuj aliflanke pritraktis nur la vidon al nia tre malgranda Esperantujo.

La dua kaŭzo estas la komprenebleco: Ĝuste tiuj homoj kiuj havas la plej grandan lernbezono ne uzis la radioelsendojn tiucele, ĉar la parolado estis aŭ tro rapida por ili aŭ ĝi enhavis tro da nekonataj vortoj. Do ili ne kapablis transsalti tiun sojlon.

La Esperanta Retradio helpas en ambaŭ kazoj: La temaro estas laŭeble vasta kaj la programoj krome enhavas ilustraĵojn kaj filmetojn kaj forestas ĉia propagando. Por ebligi al

progresantoj transpaŝi la sojlon de kompreno, la kompleta programo estas ankaŭ legebla. Tio estas vere unika novaĵo. La viglaj reagoj de la geaŭskultantoj klare konfirmas tion kaj do la Esperanta Retradio nun ofertas servon kiu vere povas kontribui al decida plibonigo de la parolnivele de multaj homoj.

Oni povus pensi ke tio estas varme akceptata en tuta Esperantujo, precipe ĉe la E-organizaĵoj. Sed el tiu flanko la eĥo estas preskaŭ nula. Eĉ okaze de la unua datreveno de la komenco de la ĉiutagaj elsendoj de tiu flanko venis preskaŭ nenio. Tamen la belga eŭropa deputito Germain Pirlot sendis kuraĝigajn bondezirojn kaj tio ja signifas rekonon ricevita de grava persono. Sed mankas la rekomendo: Mi opinias ke la Esperanta Retradio ja estas vere tre rekomendinda. Mi miras pri la silentado. Tio estas malhelpo por la evoluo de Esperanto. Mi esperas ke la koncernaj organizaĵoj kaj influhavaj personoj baldaŭ ŝanĝos sian sintenon tiurilate. Pri la neceso de la Esperanta Retradio ja ne povas esti dubo.

Anton Oberndorfer

Adreso de Esperanta Retradio:

<http://peranto.posterous.com>

fonto: Ret-Info

<http://www.eventoj.hu>

Sabate 9an de junio 2012 en Tuluzo, en la komumuma salono Barcelono, vi havos la eblon trapasi skriban ekzamenon pri Esperanto, en unu el la tri ekzistantaj niveloj. Tiu ekzamensio estos kunorganizita de UEA kaj la hungara instituto ITK samtempe en pluraj urboj en la mondo. Se vi estas interesata pri tiu ekzameno, ne atendu por enskribiĝi: plenigu jam hodiaŭ en du minutoj tiun retformularon <<http://edukado.net/alighilo?id=2012TU-FRTU>>. Se vi dubas pri la utilo de la KER-ekzamenoj... spektu tiun intervjuon de Katalin Kovats <<http://www.ipernity.com/doc/67438/9867410>>, iniciatinto de la nova KER-ekzamensistemo.

ATOMENERGIO ? NE DANKON

Dimanĉon la 11an de marto, precize unu jaron post la komenco de la katastrofo en Fukuŝimo, pli ol 60 000 personoj venis laŭ longe de la riverego Rodano, de Liono ĝis Avinjono por formi grandegan homan ĉenon. Simplaj civitanoj kaj batalantoj el tuta Francio, najbaroj de la atomenergiaj centraloj kaj loĝantoj de la najbaraj regionoj teniĝis per la manoj en la zono kie staras 14 reaktoroj, laŭ 230 kilometroj (tio estas la distanco inter Tokio kaj Fukuŝimo). Ili venis por montri sian solidarecon kun la japana popolo kaj esprimi sian volon por finfine eliĝi el



la atomenergio. Ni partoprenis kun flageto kaj memgluebla vinjeto en Esperanto.

Nikolao kaj Evelyne

Le conseil d'administration de la Fédération Languedoc-Roussillon

Elektitaj/élus la 18a de aprilo 2010 en Vergèze (renovigo en 2013)

Bichon Véronique

Carbonnel Colette

Mouré Christian « redaktoro/rédacteur » de SFS

(15 rue du Verdier 34120 Tourbes xianmoure@orange.fr)

Passarella J-François prezidanto : président

(10 passage J. Ferry 34290 SERVIAN jf.passarella@free.fr)

Perez y Sanz Maria kasistino/trésorière

(13bis, rue Haute 30310 Vergèze maria.perez@orange.fr)

Elektitaj/élus la 21a de majo 2011 en Béziers

(renovigo/renouvellement en 2014)

Bernard Francis, Bernard Monique, Boccadifuoco Josée, Bourquin Frédéric, Eysseric Serge, Mraihy Zohra

Elektitaj/élus la 31a de marso 2012 en Nîmes

(renovigo/renouvellement en 2015)

Banaszek Evelyne, Bony Jeannine, Esclapez Laurence, Hénin Jean

Lagrange Arno (sekretario/secrétaire: arno.raymond.lagrange@orange.fr)

Taupiac Pierre